# BULTENO
# DE ESPERANTISTA KLUBO
# EN PRAHA • Fondita en 1902

---

LOKA GRUPO DE ĈEA n-ro 2/1988 aprilo 1988

## Z výroční členské schůze klubu

Dne 22. února 1988 se konala výroční členská schůze Klubu esperantistů v Praze. Byly předneseny zprávy o činnosti, o hospodaření a revizní zprava za rok 1987. K předneseným zprávám nebylo připomínek, proto odstupujícímu výboru bylo vysloveno absolutorium. Následovala volba členů nového výboru klubu a revizní komise. Po přednesení návrhů plánu činnosti a plánu hospodaření na rok 1988 a jejich schválení bylo schváleno i usnesení z výroční členské schůze.

Z diskuse vyjímáme některé informace, dotazy a odpovědi:

- Český esperantský svaz přivítá upozornění na prázdné prostory pro účely činnosti svazu a pokud možno zřízení i ubytovny.
- Turistika a esperanto mají k sobě velmi blízko, přesto se na turistiku zapomíná. Odpověď: Bude řešit nový výbor.
- Uspořádat několikrát do roka esperantské propagační schůzky pro neesperantisty. Odpověď: Již se připravuje na 12. 5. 1988.
- Získat film o kongresu ve Varšavě. Odpověď: V Polském kulturním středisku vypůjčit nelze, na zakoupení nejsou valuty.
- Bylo navrženo navázat družbu s klubem ve Velingradu v Bulharsku. Odpověď: Uváží nový výbor.
- Proč není Český esperantský svaz v Národní frontě? Odpověď: Není a asi nebude, protože se neuvažuje o rozšíření Národní fronty.
- Mělo by se během schůzek více mluvit česky, aby se začátečníci více dozvěděli, o čem se mluví. Odpověď: Začne-li se během schůzek mluvit česky, přešlo by se na češtinu pravděpodobně zcela. Je možné přednášejícího požádat, aby mluvil pomaleji, eventuelně i zřetelněji vyslovoval.
- V Praze existuje druhý klub esperantistů, zaměřený na ochranu přírody a malé vodní elektrárny. Odpověď: Nový výbor s tímto klubem naváže styky.

Dne 24. února 1988 se konala ustavující schůze nově zvoleného výboru Klubu esperantistů v Praze, kde byly rozděleny funkce takto:

| | |
|---|---|
| předseda | Ing. Veselý |
| místopředseda | Ondráček |
| pokladník | Křesinová |
| členský referent | Hubnová |
| pedagogický referent | Štruncová |
| propagační referent | Havlík |
| zástupce mládeže | Pištíková |
| hospodář | Sihelník |
| Bulteno, programy | Patera |
| člen | Šperling |
| člen | Vích |

revizní komise ve složení: Kadlecová, Ing. Khail, Kynčl, Ševčík.

Tiun ĉi raporton ni prezentas ĉeĥe, ĉar ankaŭ la traktado de la kunvenoj okazis en la ĉeĥa lingvo.

El leteroj de niaj amikoj

...Same mi dankas pro la invitilo al la arbceremonio. Imagu, ke ĝi alvenis ĝustatempe. Hieraŭ mi ricevis ĝin dum la planttago. Mi rigardis la horloĝon kaj kontrolis, kioma estas en Prago – ĉi tie estis jam la deka vespere, do ĝuste estis la tria en Prago. Nekredeble, ĉu? Studento ĝin alportis vespere post la "memstudado" kaj' petis pardonon pro la prokrasto... Tamen bona koincido, ke tiun leteron mi ricevis je tioma horo! Mi partoprenis vian ceremonion enanime kaj firme kredis, ke ĝi estis sukcesa kaj utila propagandado.... aŭ ekpropagandado. Ja la arbo kreskos kaj tutcerte haltigos preterpasantojn, kiuj gapos kaj cerbumos – kio estas "Esperanto".
... Gratulon.
La 17-an de novemoro 1987 Richard Howard, Ĉinujo

... Dum la tago de planto de la memortilio mi estis dematene pense kun vi en Prago. Ĉi tie estis terura vetero, de mateno pluvis, mi kleris je sankta Petro, ke li tro frue akvumas la ankoraŭ neplantitan tilion. Je la 14a ĉesis pluvi, ekbrilis la suno kaj je la 15a, estis bele suna. Mi rememoris, ĉu same estas ĉe vi, ke tio estas aŭguro, ke la tilio bonfartos...
La 24-an de novembro 1987 Olga Ungerová, Neratovice

Jes, karaj geamikoj, la tilio bonfartos, transvivos nin ĉiujn kaj fariĝos herolde al niaj posteuloj, al kiuj ĝi transdonos ¨mesaĝon pri nia klopodo pri justa aranĝo de la lingva afero en la mondo, pri nia helpo konservi la pacon sur la terglobo, pri interkompreniĝo de homoj el ĉiuj kontinentoj... H.Š.

Niaj skspozicioj

La ekspozicio de fotografaĵoj kaj desegnaĵoj okazis ekda la 23-a de novembro ĝis la 29-a de novemtro 1987. Dume la ekspozicio estis vizitantoj informataj pri Esperanto-vivo, agadoj kaj ankaŭ estis vendataj diversaj E-materialoj. La ekspozicion vizitis ĉirkaŭ 420 homoj. La plej malproksima gasto estis japana studento, studanta en FRG. Al ĉiuj vizitantoj la ekspozicio tre plaĉis, kion ili esprimis per enskriboj kaj dankoj en memorlibron. La eksposicio konatiĝis la publikon kun Esperanto kaj kun diversaj eblecoj de la Esperanto-agado. Sihelník

Dum la tagoj de la 7-a ĝis la 13-a de decembro 1987 estis realigita la ekspozicio de slojdoj. Vizitis ĝin pli ol 350 homoj, do ĉiutage meznombre 50 homoj. Ĉiuj admiris la belajn, kolore harmoniajn, perfekte faritajn brodaĵojn, kroĉtrikaĵojn, belajn braceletojn kaj kolierojn al ledo, modernajn trikvestojn kaj diversajn etaĵojn. Siajn slojdojn sendis dek ses geamikoj el Bohumín, Olomouc, Pardubice, Slavičín, Trutnov, Hradec Králové kaj Praha.

I-an premion akiris s-ino Čechová el Slavičín por la blanka, flave brodita kovrotuko elegante kaj perfekte brodita.

II-an premion ricevis s-ino Pouchlá el Praha por riĉe kaj bele brodita kovrotuko en harmoniaj koloroj.

II-an premion gajnis s-ino Ambrožová el Praha por bela kaj sendifekte farita trikvesto en elegantaj koloroj.

La vizitantoj admiris ne nur la belajn kovrotukojn, sed ankaŭ tre belajn etaĵojn kiel ekzemple la trikita katineto. Ankaŭ infanaj ekspoziciaĵoj estis ĉarmaj.

Sed la ĉefcelo de nia ekspozicieto estis informi ĉiujn vizitantojn pri la Esperanto-agado, pri kreinto de Esperanto L. L. Zamenhof, kies busto staras frunte de la ejo sub la Esperanta stelo, inter floroj kaj ŝtata kaj Esperanta flagoj. La vizitantoj aŭdis ankaŭ Esperantajn kantojn kaj parolon, eksciis pri E-movado kaj celo de ĉiuj esperantistoj kaj ankaŭ kiel ili povas komenci studi la Esperantan lingvon. La ekspozicieto estis sukcesa. Křesinová

Artur Kubulnieks, Litovio

## R I P R O Ĉ O

(Dediĉita al praga leteramikino)

Kial ne preterpasis
Simile homojn aliajn
Vi vojojn miajn?
    Kial vi ĵetis ŝtonon
    En la oceanon
    De mia animo?
Kial vi tuŝis la kordojn
Sur la harpo
De mia koro?
    Kial metis vi ankron
    Sur la sunriĉan ĝardenon
    De mia vivo?
Kial sopiris, amis
Kaj fine turmentis
Vi min?

Jana Cíchová

## V O J K R U C I Ĝ O

Du tagoj nur – kaj jam disiĝo!
Tie sur la voj-kruciĝo.
Mian manon kisis vi nur preterpase,
tamen bela sonĝ' estiĝis tuj postkise:
Sídas mi – vi ĉepiede surgenue,
vian kapon mi dorlotas amo-tene.
Kaj subite mi vin kisis!
Miaflanke! — La virino!
Okulgapis vi - kaj fino.

Sonĝo en vekiĝon pasis!

Mia am' nur sonĝo estu,
reve via ĝi ja restu!

(El la poemaro KVAR SEZONOJ)

Lastmomenta informo:

La 19-an de marto 1988 transdonis delegacio de MEM-sekcio de ĈEA al la reprezentantoj de la Plilarĝigita Kunsido de la Prezidantaro de Mondpaca Konsilio jene tekstantan salutleteron: "Ĉeĥa Esperanto-Asocio – sekcio de Mondpaca Esperantista Movado – salutas la Kunsidon de la prezidantaro de Monda Konsilio en Prago dum la tagoj 19.-21.3.1988. Ni deziras al via renkontiĝo kaj traktado plenan sukceson, kiu helpos al la sekurigo de la mondpaco. Ni, esperantistoj-pacdefendantoj, aliĝas al via celado apogante ĝin inter esperantistoj de la tuta mondo tiel, ke ni la rezultojn de via traktado esperantigos kaj aperigos en Esperantaj gazetoj."

La delegacio de la ĈEA MEM-sekcio estis akceptita afable kun granda simpatio al Esperanto-movado kaj la teksto de la salutletero estas aperigota en la Kunsida Bulteno.

La alportita porpaca materialo en Esperanto estis metita sur tablojn en la antaŭkunsidejo, je dispono al la partoprenontoj de la renkontiĝo, inter kiuj troviĝis ankaŭ d-ro Imre Pethés, prezidanto de MEM. La Kunsidon prezidis s-ro Romeš Čandra.

H. Štruncová

---

La programo de niaj klubkunvenoj:

| | | |
|---|---|---|
| 11. 4. | - Pri la aktivecoj de Kei Kurisu | - Patera |
| 18. 4. | - Libera tribuno | |
| 25. 4. | - Trarigardo de la Esperanta gazetaro | - Štruncová |
| 2. 5. | - Instruado de la Esperanto-himno "La Espero" (kunportu la tekston de la himno) | - Vích |
| 16. 5. | - Ĝenerala Konferenco de MEM en Budapeŝto | - Patera |
| 23. 5. | - Esperanto-poetoj en majo | - Seemannová |
| 30. 5. | - Trarigardo de la Esperanta gazetaro | - Štruncová |
| 6. 6. | - Superrigardo pri Aŭstrio | - Patera |
| 13.6. | - Libera tribuno | |
| 20. 6. | - Junulara vespero | |
| 27. 6. | - Trarigardo de la Esperanta gazetaro | - Štruncová |

---

Nia unua nacilingva vespero por la neesperanta publiko okazos la 12-an de majo 1988 en la klubejo Kodaňská. La ĉefa programo estas la prezentado de s-anino Eva Seemannová "Půl století pod šminkou" de Č. Vidmann.

---

La estraro de la klubo dankas al jenaj ges-anoj pro iliaj grandanimaj donacoj por la klubo: Willy Bürgmeister, Svedio, Olga Ungerová, Neratovice, Jan Šilhán, Adolf Bartošík, Ondřej Jeníček, Marie Cejnarová, Ladislav Kynčl kaj Jaroslav Šperling.

Žádáme členy, aby při placení příspěvků psali na složenkách jména čitelně, nejlépe hůlkovým písmem nebo strojem. Jména na složenkách jsou někdy tak nečitelná, že se může stát, že nemůžeme známky svazové objednat, a tak čekáme, až se člen sám přihlásí, že známku neobdržel. Pokud se tak stalo, zašlete útržek složenky a na zadní stranu napište jméno čitelně. Útržek potom vrátíme! Křesinová/Kadlecová

Hledám projektanta vnitřních úprav a topení WAW pro klubovnu ve Vejvodově ulici. Přihlaste se na adresu: Ing. Ludvík Veselý, Litvínovská 527, Praha 9, PSČ 190 00, tel. 888 781.